FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL TRIMONATA BULTENO

N° 54a (nova serio) N° 139a PRINTEMPO 1981

REDAKTAS : Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE

Eldonita, ekspedita de :

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 10.00 Fr. - Subtenkotizo = ek de 15 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto-Bulteno, sen membreco = 10 Fr.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"


## MAJO, MAJ, EN MORTAIN'

Malantaŭ la bulten'
Kiom da zorgo, pen'
Deĵore sur posten'
Espere al la ven' :
Majo, Maj, en Mortain'

Laboro laŭ kunven'
Sen ripoz' ĉe l'kamen'
Sen dorm' en palanken'
Por ni nur la refren'
Majo, Maj en Mortain'

Eĉ la frua maten'
Por ni estas gehen'
Ĉu velkos l'entrepren'
Aŭ triumfos kompren' :
Majo, Maj, en Mortain'



Haltu nun la faden'
Ĉiuj ek al promen'
Forestu la ĉagren'
Jubilu la solen' :
Majo, Maj, en Mortain

Gaston VERON

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépôt Légal 1er Trim.1981
le Gérant : P. LEMARCHAND

# VIVO DE LA GRUPOJ

## Y V E T O T

La tradicia Reĝkuka Festo okazis en la ·.J.C. , la 25an de Januaro. Pro la kutimo vidi amason de partoprenantoj, oni surpriziĝis vidante nur tridekon da personoj . Varma etoso estiĝis dum divenludo, kiu iom atencis al la diskretemo de la virinoj. Reprezentantoj de la gazetaro fotografis .

Nia nova kasistino, S-ino SAILIO, 110 rue de l'Etang, memorigas pri nia C.C.P. 1 284 35 ROUEN "Centre Culturel Esperanto d'Yvetot" Tre utila por tiuj kiuj ne ankoraŭ pagis sian kotizon .

Kurso por Skoltoj okazas sabate posttagmeze, kun ses lernantoj, sub gvidado de S-ion POTTIER .

o------o------o------o

## C A E N

Post organizo de Ekspozicio, apud la Stacidomo , oni malfermis kurson : deko da personoj ĉe-estas tiun kurson, kiu okazas ĉiulunde, je la 18a horo, en la korto, 53 rue de la Gare Ciuj kursanoj estas membroj de la Fervojista Francia Esperanto - Asocio . En tiu sama loko, la membroj de la Grupo retroviĝas por la Monata Kunveno, ĉiu unua merkredo de la monato : paroladetoj, diskutoj, kantoj, kun de tempo al tempo, projekciado de diapozitivoj.

o------o------o------o

## L E H A V R E

Monataj Kunvenoj

17.01 - Laŭrenca : "Antaŭen" , aŭ malkovrado de helpmovado Savarmeo .

Provtempo por mia profesia trejnado instigas min atesti pri tiu movado. Ĝenerale, la vorto vekigas falsan bildon : Asociano akceptas trampon donante liton kaj supon .

La movado jam havas longan historion : Anglo, William Booth, en la jaro 1878, kreis Savarmeon.Ĝi devenas de Protestantismo ; tamen, Booth deziris nur venigi popolon al jam aktivaj eklezioj .

Nune, ĉiuj havas konon pri la bonfarado de la Asocio .

En Francio, ĝi estas estrata de "Generalo" . La organizado estas dividita en tri areoj : Parizo, Liono, Suda regiono .

La Havra Asocio estas sociala hejmo : centro pri gastigado kaj sociala re-eniĝo. Ĝi sukcesigas la mision pere de laboro .

La gastoj devenas el marĝenaj medioj. Unue fordonitaj al si mem ili ne plu posedas ligilon kun la socio; izolitaj ili estas, kaj la administracioj ne volas helpi.

La "Hejmo" estas por ili malfermata pordo al pli bona estonteco: tie, ili trovas la okazon bremsi sian glitadon malsupren , sur la malbona deklivo... Sed ili bezonas volon. Ĉu ĉiuj sukcesos ? al maturaĝuloj, la sociala reiro estas malfacila, des pli kriza dum ekonomia malekvilibro .

La gastigantoj estas bone konsiderataj. Savarmeo viŝas la pasintecon. Animanto povas helpi : li gvidas al kunveno de senlaboruloj .

En Savarmeo estas ankaŭ organizitaj laboroj okazaj, ekzemple karton-kolektado .

Religio inspiris la movadon, sed ne estas trudata al la homoj. En la tuta mondo, la Internacia Movado zorgas pri la infanoj, la tria-aĝuloj, inspirata de tiu slogano :

" Helpi la popolojn, alporti kuraĝigon ... "

... / ...

LE HAVRE ( sekvo)

21.02 - " Brazilio , la urbo de la 66a Universala Kongreso "
Paroladeto pri Brazilo, vasta lando, kaj prezentado de diapozitivoj afable pruntitaj de U F E .
La urbego "artefarita" konkretigas la revon de pluraj generacioj de Brazilanoj. Bildo de funkcia urbanismo, miraklo arkitektura, la ĉefurbo de Brazilo fariĝis la vera poluso radianta siajn pozitivajn influojn sur la tutan landon .
En tiu metropolo de l' Estonto kunsidos la Esperantistoj , de la 25.07 ĝis la 01.08 , por la 66a Kongreso de U.E.A.

21.03 - S-ro HUET raportas al ni pri sia vojaĝo al MEKSIKIO

Generalaj informoj: Meksikio, aŭ pli ĝuste "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksikio " estas granda lando, kies surfacamplekso estas du milionoj da kvadrataj kilometroj, limigita :
- Norde , per Usono
- Sude, per Gvatemalo kaj Belizo
- Okcidente, per Pacifika Oceano
- Oriente, per la Golfo de Meksikio, kaj Antilja Maro.

La loĝantaro, sesdek tri milionoj, konsistas el :
83 % da mestizoj, 15 % da indianoj, 2 % da kreoloj.
Meksikio estas Federacio de 31 ŝtatoj, plus la federacia distrikto de la urbo Meksiko (Mexico ciudad) .
Teorie, Meksikio estas respubliko. Estas multaj partioj sed, fakte,nur unu el ili, la P.R.I. (Partido Revolucianario Institutional),kiu estas la partio de la Prezidento, havas ĉiujn povojn .


L'Antikva Meksikio : Estas tre malfacile dati la diversajn civilizaciojn, pro tio ke, ĉe la duono de la deksesa jarcento, la hispanaj konsistadoroj dtruis preskaŭ ĉiujn dokumentojn .
Tial, la arkeologiistoj devis -kaj devas- studi kaj eltrovi la signifon de la multnombraj signoj trovitaj sur la monumentoj .
Pri la Majoj (de la kvara ĝis la naŭa jarcento) oni konas nur la ciferojn, la datojn kaj la nomojn de la dioj.
Plue ekzistis, kelkafoje samtempe, civilizacioj diversaj en pluraj partoj de Meksikio kaj Gvatemalo. Oni rimarkis ke certaj estis limigitaj je tre malgranda areo, kaj disaperis abrupte . Aliaj disfluiĝis en multajn regionojn .
Tre ofte, la diversaj civilizacioj miksiĝis. Tial estas tre malfacile trovi arĥitekturon propran je unu sola popolo . Oni povas konstati influojn diversajn sur la konstruaĵoj kaj la desegnaĵoj de la monumentoj .

De la deveno de la "Enplumigita Serpento" : Verŝajne, la Majoj tiun beston elektis kiel Dion .
La homoj, kiuj vivis tie-ĉi, diskovris multajn krotalojn, ĉefe en la arbaroj. Tiu speco de serpentoj, kiun oni nomas ankaŭ " serpento kun sonoriloj" sin montras precipe, je la alveno de la pluvsezono. Je tiu periodo, ili eliras el la arbaroj por sekskuniĝi.
La pastroj rimarkis ke, jaron post jaro, tiuj bestoj havas unu pluan vostan skvamon-sonorilon. Tial la pastroj konsideris krotalon kiel simbolon de la tempo. Ili aldonis la plumon de la birdo ibiso, simbolo de la spaco.

21.03 - En tiu sama tago, post la vojaĝo al Meksikio, la Grupanoj kunvojaĝis al pli proksima loko : 14 el ili retroviĝis ĉe restoracio de l'proksima angulo .Kutima bonhumora festo por la stomako !

o-----o-----o-----o

# KONGRESLOKO : LA BLANKA ABATEJO



Ĝia historio fontas el la epoko de " Vilhelmo la Bastardo " kiu fariĝis " Vilhelmo la Konkeranta" Duko de Normandio kaj Reĝo de Anglio .

Dekkvino da jaroj antaŭ la fama batalo pri Hastings (1066), li metis sian duonfraton Roberto kiel Grafon de Mortain. Tiu urbeto estis en konstanta konfuzo pro ribeloj . Ĝi ja konsistigis esencan defendolokon por la sudo de Duklando . Roberto restarigis la sekurecon .

La Grafo de Mortain havis Kapelo-Pastron :Vital sankta pastro veninta el Bayeux. Rapide, ĉi tiu sentis malagrablecon vivante ĉe la kortego nobela. Forlasante la kastelon, li ermite instaliĝis en la rokaĵoj de Neufbourg, du paŝojn je la akvofaloj de la Cance. Lia groto rapide fariĝis nesufiĉa por enteni liajn disĉiplojn. La Grafo de Fougères donacis al li arbaron, sude de Saint Hilaire. Vital fondis tuj monaĥejon : Savigny . Ek de la komenco ĉe estis 140 monaĥoj .

Vital havis fratinon : Adeline. Ŝi venis kun kunulinoj, kaj fondis en la sama urbo komunumon monaĥinan. En posta tempo, ŝi instaliĝis en Mortain,apud la kaskado .

La Monaĥinoj vestiĝis per blanka krudŝtofo kaj la urbanoj diris "La Priorejo de la Blankulinoj". Pli poste la Priorejo akiris la titolon "Abatejo Reĝa" sed oni alnomis ĝin "Abatejo de la Blankulinoj" kaj poste , " La Blanka Abatejo " .

La nuntempa koloro de la muroj neniel konformiĝas al tiu nomo: oni sciu ke la Germanoj, en la jaro 1942a, nigrigis ilin sisteme, por kamuflado ...

Ni vidis ke la instalado lokiĝis apud la kaskado: sed la rokoj estis tre malsekaj tie,kaj definitiva loko estis elektata; la konstruado ekkomencis en 1180 kaj finiĝis en 1205 . dato de enloĝiĝo de la monaĥinoj, kiuj nombriĝis kvardek, kun unu kapelestro kaj unu konfesanto.

La Blanka Abatejo estas la abatejo por virinoj la plej malnova kaj la pelj bone konservita en Francio : Gi valoras la viziton ...

# KONGRESO



UNUIĜO DE NORMANDAJ ESPERANTISTOJ KAJ FEDERACIO U F E

| | |
|---|---|
| DATO | Sabato 16an kaj Dimanĉo 17an de Majo |
| LOKO | ABBAYE BLANCHE 50140 MORTAIN - Manche |
| KONDIĈOJ | En tiu funkcianta sed "malfermita" Abatejo, niaj gastigantoj metos je nia dispono 14 dulitajn ĉambrojn (kiujn ni rezervos prefere por paroj aŭ samfamilianoj) aliaj personoj loĝos en unulitaj ĉambretoj . Ankaŭ estos kuvenejoj kaj manĝejo . Helpo estos petata por la preparo de la tabloj, servo de la manĝoj, kaj purigo de la teleraro. |
| PREZOJ | Du tarifoj: 1) Adoltoj 2) Junuloj (lernejanaj k.senlaboraj) |

| | Adoltoj | Junuloj |
|---|---|---|
| Sabato tagmanĝo | 25 | |
| - vespermanĝo | 18 | 14 |
| Tranoktado k. matenmanĝo | 24 | 17 |
| Dimanĉo tagmanĝo | 30 | 20 |

o———o———o———o

## P R O G R A M O

| | | |
|---|---|---|
| Sabato | 14.00 | Akcepto de la Partoprenantoj |
| | 15.00 | Ekiro por vizito de la urbo kaj akvofaloj |
| | 18.00 | DI-servo (kun Esperantlingvaj legaĵoj) |
| | 19.00 | Komuna Vespermanĝo |
| | 20.15 | Prezento de la Abatejo (parolado + diapozitivoj) |
| | | Brazilia, la urbo de la 66a Universala Kongreso |
| | | Esperanto-kantistoj |
| | | Balo (vi povas kunporti danco-diskojn ) |
| Dimanĉo | 8.30 | Matenmanĝo |
| | 9.30 | Komuna Ĝenerala Kunveno de U N E k. Fed. de U F E |
| | | Alparoloj de la Prezidantoj<br>Agadraportoj de la Grupoj<br>Financaj raportoj<br>Agadplano 1981/82<br>Bulteno<br>Estontaj renkontiĝoj<br>Elektoj : eliranta triopo S-oj Gibaux k.Quillaud |
| | 12.30 | Komuna Tagmanĝo |
| | 14.30 | Vizito de la Abatejo, kaj de la ekspozicio pri Afrika Arto |
| | 17.00 | Adiaŭa manĝeto |

o———o———o———o

# DIVERSOJ

## RENKONTIGOJ - KONGRESOJ

FERVOJISTOJ

En Normandio, la membroj de la Fervojista fako estas sufiĉe nombraj. La Internacia Fervojista Esperanto-Asocio havos sian Kongreson ĉi-jare en Regensburg (Suda parto de Germanio), samtempe kiel la jara Kunveno de U N E : estas malavantaĝo, ĉar kelkaj Fervojistoj, irantaj al Germanio, ne povos samtempe troviĝi en Mortain; sed aliflanke, tiuj povos poste raporti pri sia vojaĝo en pluraj Grupoj .

Tamen oni ekscias ke la Ĝenerala Kunveno de la Franca Sekcio de la Fervojistoj, okazos en nia provinco : Colleville sur Mer (Calvados) kun diversaj aranĝoj, inter la 15a kaj la 20a de Septembro. Pliajn informojn vi legos en la venonta bulteno, ĉar eble, la membroj de U N E , eĉ ne Fervojistoj, povos aliĝi .

J.E.F.O.

La Junulara Esperantista Franca Organizo , havos sian jaran renkontiĝon de la 5a ĝis la 8a de Junio, apud Perpignan : " Frenezaj Tagoj en Perpignan "
Informoj : JEFO - 4 bis rue de la Cerisaie - 75004 PARIS

NI FUNEBRAS Oni ĵus ekscias pri la forpaso de S-ro René PARRINGTON el Rouen, 87 jara .Niajn amikajn pensojn por lia familio .

Ni estas informitaj pri la forpaso de la Patrino de nia amiko Pierre POTTIER . Niajn kondolencojn al la tuta familio POTTIER .

o------o ------ o------o

VOUS AVEZ PU LIRE , dans ce numéro 139 -

1 - M.Gaston VERON vous invite au Congrès " Majo, Maj' en MORTAIN "

2 et 3 - La Vie des Groupes

4 - Le Lieu du Congrès : L'Abbaye Blanche . Un doigt d'histoire d'une Abbaye bien conservée .

5 - Renseignements et Programme pour ces journées des 16 et 17 Mai.

6 - Informations diverses: Les Cheminots Esperantistes en Normandie; le prochain bulletin vous donnera des informations sur une rencontre qu'ils projettent dans notre province .

Quant à la Jeunesse Esperantiste Française, elle vous donne rendez-vous pour les " Journées Folles de Perpignan "

7 - Le bulletin d'adhésion, que vous voudrez bien adresser à M.VERON, rapidement , car le nombre des participants doit être connu pour le 1er Mai .

Sur la même page, vous trouverez les Pouvoirs, que vous pourrez remplir si vous n'assistez pas à l'Assemblée Générale : Merci de les adresser, soit à la personne chargée de vous représenter, soit, en blanc, à M. Gaston VERON .

Enfin, nous vous recommandons de vous organiser au sein des Groupes, pour faire le vojage à plusieurs personnes .

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais - Dépôt Légal 1er Trim.1981
Le Gérant : P. LEMARCHAND

# ALIĜILO

NOMO
Adreso

| | | | |
|---|---|---|---|
| ☐ | Mi venos sola | = | 1 persono |
| ☐ | Kun mi venos plenkreskuloj(Nomoj,adresoj dorse) | = | personoj |
| ☐ | Kun mi venos Junuloj | = | personoj |
| ☐ | Ni ŝatus havi dulita(j)n ĉambro(j)n por paroj | | |
| | Suma nombro | = | ☐ |

Rezerviga kalkulo

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Aliĝkotizo | 20F | x | = | |
| - - Junulo | 10 | x | = | |
| Libera subtenkotizo | | | = | |
| Tagmeza manĝo sabate | 25 | x | = | |
| - - - Junulo | 17 | x | = | |
| Vespera manĝo sabate | 18 | x | = | |
| - - - Junulo | 14 | x | = | |
| Tranokto kaj matenmanĝo | 24 | x | = | |
| - - - Junulo | 17 | x | = | |
| Tagmeza manĝo dimanĉe | 30 | x | = | |
| - - - Junulo | 20 | x | = | |

Mi kunsendas bank/ aŭ poŝt/ĉekon de . . . . . . . . .
" Union des Esperantistes de Normandie" - C.C.P. 283 40 H ROUEN.
Mi sendas al : S-ro Gaston VERON
Place de la Petite Bruyère - 61 700 DOMFRONT

ATENTU ! ! Ni devas koni la precizan nombron de partoprenantoj por la dimanĉa manĝo, plej laste la 1an de Majo : postan enskribon ni ne povas garantii ! !

---

U. N. E. RAJTIGILO

MI, subskribinto
ne povas ĉe esti la Ĝeneralan Kunvenon de U.N.E.
Mi transdonas mian povon al :
kaj petas lin/ŝin agi en mia nomo pri ĉiuj decidoj kaj balotoj.
dato kaj subskribo

Super la subskribo
Bonvolu permane skribi
" Bon pour Pouvoir "

---

N O R M A N D A F E D E R A C I O D E U.F.E. RAJTIGILO

MI, subskribinto,
ne povas ĉe esti la Ĝeneralan Kunvenon de la Normanda Federacio.
Mi transdonas mian povon al :
kaj petas lin/ŝin agi en mia nomo pri ĉiuj decidoj kaj balotoj.
dato kaj subskribo

Super la subskribo
Bonvolu permane skribi
" Bon pour Pouvoir "